

Raporto pri kunveno de Esperanto por UN - 23-a septembro

Kunvenis 16 membroj de la kvar subgrupoj, Novjorko, Ĝenevo, Vieno kaj Parizo. Bedaŭrinde, Francis Hult, grava aktivulo ĉe Novjorko, ne povis partopreni. Ankaŭ ĉeestis la invititoj Renato Corsetti (Komitatano de UEA) kaj David Ruíz Sánchez (de TEJO).

La ĉeestantaj membroj estis: Alfred Heiligenbrunner (Vieno), Anna Bennett, Cesco Reale (Genevo), Didier Janot (Parizo), Didier Loison (Parizo), François lo Jacomo (Parizo, estrarano de UEA), Gilles Tabard (Parizo), Hans-Michael Maitzen (Vieno), Humphrey Tonkin (Novjorko), Jon Liechty (Novjorko), Laure Patas d'Illiers (Parizo), Nicole Margot, Norina Schantl (Vieno), Rafael Lima, Ruth "Margo" Keves-Cohen kaj Tamiris Queiroz.

Renato raportis pri siaj kampanjoj rilate al specialaj tagoj de UN, per disvastigo de pluraj tradukoj kaj de afiŝoj, kaj de la mesaĝoj verkitaj de la grupo Esperanto por UN. Gravas, ke oni utiligu tiun materialon en la diversaj UN-centroj kaj ekstere.

David Ruíz Sánchez prezentis sin kel nova oficisto pri eksteraj rilatoj de TEJO. Li antaŭvidas kunlaborojn inter TEJO kaj Esperanto por UN, kaj parolis pri la studsesio en Hungario pri interkultura komunikado, organizita de TEJO, kunlabore kun la Konsilio de Eŭropo (<https://www.tejo.org/partoprenanto-studsesio-hungario-2023/>) kaj kun E-interpretado.

Rafael prezentis kelkajn statistikojn pri la retejoj kaj sociaj retoj. La retejo (esperantoporun.org), ekde januaro 2023, ricevis 16 mil vizitojn. La blogo (unesperante.wordpress.com) havas 1200 sekvantojn. En Twitter estas ankaŭ preskaŭ 1200 sekvantoj. En Instagram estas 600 sekvantoj. La membroj estis invititaj helpi pri kreado de enhavoj, ĉu pri la specialaj tagoj, UN-temoj, raportoj pri kunvenoj kaj agadoj, k.s.

La grupo en Facebook, kiun prizorgas Jon, havas preskaŭ mil membrojn. Jon raportis pri sia agado ĉe la Facebook-grupo. Li klopodas publikigi pli da novaĵoj, kaj oni vidas pli da komentoj.

Humphrey komentis pri la tri ĉefaj celoj de la grupo: 1. Konvinki UN-on, ke lingva diskriminacio kaj maljusteco ekzistas kaj estas grava problemo; 2. Montri la solvon kiun reprezentas Esperanto, kaj la eblecojn de internacia kunlaboro de esperantujo; 3. Montri nian interesiĝon pri mondaj problemoj, ĉar nur komune ni solvos la nunajn grandajn mondajn problemojn – kaj gravas, ke UEA estu rigardata kiel fidela kunlaboranto en tiuj klopodoj. Li invitis ĉiujn pripensi kiel bone agadi por la 75-a datreveno de la Deklaracio de

Homaj Rajtoj, kaj por la Celoj por Daŭripova Evoluigo, kaj aktivi ĉe la NRO-Komitatoj kiuj funkcias sub la regado de CoNGO, pri diversaj temoj, inkluzive la Komitato pri Lingvoj (li jam sendis al la grupo detalojn). Humphrey ankaŭ klarigis, ke la Universala Kongreso en Aruŝo prezentas unikajn eblecojn por kunlaboro kun UN-instancoj ĉirkaŭ la demando de la statuso de afrikaj lingvoj. En Novjorko li kaj Francis celos engaĝi afrikajn misiojn ĉe UN, precipe la tanzanian pri tiu temo.

Ankau sur la tagordo en Novjorko estas daŭrigi la kontaktojn kun la (nun) eksprezidanto de la Ĝenerala Asembleo de UN, amb. Korosi.

François kaj aliaj kunlaborantoj de la subgrupo de Parizo parolis pri la rilato kun Unesko kaj partnereco kun ILEI. Eblas proponi UEA-on kiel asociitan organizon de Unesko, do en pli alta kategorio de konsultaj rilatoj. François raportis pri la bona rilato kun la Komitato pri rilatoj inter NRO-oj kaj Unesko (NGO-UNESCO Liaison Committee), la projekto Danco por Paco (<https://danse-paix2024.org/>), kaj invitis homojn partopreni en la Ĝenerala Konferenco de Unesko.

Cesco kaj kunlaborantoj de la subgrupo de Ĝenevo informis, ke la ĉefa laboro nuntempe estas organizi partoprenon ĉe la Forumo pri Minoritataj Popoloj.

Tamiris prezentis sin kiel novan respondeculon pri sociaj retoj de UEA. Ŝi proponis pli proksiman kunlaboron rilate al sociaj retoj, kaj partoprenos ankaŭ ĉe la subgrupo de Ĝenevo.

Hans-Michael kaj kunlaborantoj de la subgrupo de Vieno informis, ke la ĉefa nuna laboro estas partopreno en la Komitato pri Paco.

La venonta kunsido estas provizore decidita por la 2a de decembro.

Aliaj proponoj:

- Humphrey revizias la Terminaron pri UN (trovebla ĉe esperantoporun.org). Homoj estas invitataj helpi. Ili kontaktu Humphrey.

- Cesco proponis kreado de enketon pri lingvaj rajtoj, kiu estu prezentita al homoj dum UN-kunvenoj, kaj por atentigi pri la temo, kaj por kolekti kontaktojn.

- Margo proponis kreadon de kanalo en Telegram, ĉar en multaj landoj aliro al Facebook, Twitter kaj Instagram estas malpermesata.

- François proponis profiti la UK-on por provi organizi subgrupon ĉe Najrobio.
- Didier kreis malneton de enketo por diskonigi dum la Ĝenerala Konferenco de Unesko. Li petos tradukojn al, almenaŭ, la ses oficialaj lingvoj de UN.